

John Ellerton,
Finiĝas nun alia tago

tradukita de William John Downes

1. Finiĝas nun alia tago,
jam venis la vespera hor'.
Kunvenis ni por adorado
plaĉanta al la Di-Sinjur'

2. Ni dankas Vin, Savanto
nia,
ke sur la tuta mond-teren'
la sankta eklezio Via
staradas firme ĉe posten'.

3. Ruliĝas tero, brilas lumo
de ne-ĉesanta maten-glor'.
Leviĝas laŭdo, preĝ-parfumo
konstante, kiel dolĉ-odor'.

4. Ekdormas ni post sun-
subiro;
gefratoj en la okcident'
vekiĝas kun novtag-aspiro
Vin glori per viv-elokvent'.

5. Formortos mondaj impe-
rioj,
sed Via regno kreskos plu.
Al Vi sin cedos dinastioj,
Venkinto estos vi, Jesu'!

...

John Ellerton,
Forpasis tiu tag',
Sinjoro

tradukita de Frieder Weigold

1. Forpasis tiu tag', Sinjoro,
Kaj profundigis la senlum'.
Vi gardis nin de ajn doloro.
Nin gardu ankaŭ dum nok-
tum'!

2. Ni rotacias en la tagon.
En nokta paco dormas ni.
Kaj portas lumon trans la
maro
La suno, kie brilas ĝi.

3. Senĉese kiel la mateno
Briladas super tera rond',
Eksonas laŭdo pro la beno
Al ĉiu sur la vasta mond'.

4. La suno, kiu ĵus subiris,
Ja brilas en plu fora land'!
La gloron, kiun ni admiris,
Anoncas plu preĝada kant'.

5. Pereas regnoj. Tiel estu!
Kaj sole staras via tron',
Ke sole via regno restu
Je fina tag' sub unu kron'.

...

John Ellerton,
Du lässt den Tag, o
Gott, nun enden

tradukita de Raymund Weber

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas ba-
rita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de WILLIAM JOHN DOWNES (*1892 - †1987).

Arg-130-302 (2004-02-04 11:38:05)

Tiu ĉi traduko aperis en la Eku-
mena Diserva Libro "Adoru",
eldonita en 2001 de Internacia
Katolika Unuiĝo Esperantista
(IKUE) kaj Kristana Esperanta
Esperanto-Ligo (KELI), kanto
numero 153.

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.

Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)

Mi, Manfred Retzlaff, ricevis
tiun ĉi tradukon de la kanto
en 2008-11-06 de sinjoro
Frieder Weigold (Birkenstr.
12, D-82178 Puchheim, Ger-
manio), kiu mem faris la
tradukon en Esperanto. S-ano
Weigold verkis tiun tradukon
- kiel li diris al mi - laŭ la
germanigo farita de s-ro Ray-
mund Weber. Tiu germanigo
estas trovebla en la germana
katolika kant-libro "Gotteslob"
(= Laŭdo de Dio), n-ro 981,
pli nova eldono. La teksto kun
la muzik-notoj troveblas an-
kaŭ en la retejo [http://www.
documentacatholicaomnia.u/
01p/2006-09-10,_SS_
Benedictus_XVI,_Ves_er_
in_der_Kathedrale_in_
Muenchen,_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en la Germanan de Raymund Weber.

Arg-130-256 (2008-11-08 15:30:25)

Diese Übertragung ins Deutsche ist
abgedruckt in dem Gesangbuch der
Katholischen Kirche in Deutschland
"Gotteslob", in der neueren Ausgabe.
Der Text mit den Muziknoten findet
sich auch auf der Heimseite [http://
www.documentacatholicaomnia.u/
01p/2006-09-10,_SS_
Benedictus_XVI,_Ves_er_
in_der_Kathedrale_in_
Muenchen,_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).